

## HISTORIA PROMENO EN KOMÁRNO

Komárno, la pli ol 700-jara urbo situas sur la maldekstra bordo de Danubo, sur la orienta angulpinto de le Ora Interriverejo, ĉe la renkontiĝo de Danubo kaj de la rivero Vág. La historian evoluon de la urbo influis esence ĝia geografia situo, ĝian komercon akcelis rekte la akvovojoj. Ĝia geografia situacio kontribuis en granda mezuro al ĝia pleniĝo je homoj, la urbo kaj sia ĉirkaŭaĵo estis loĝata teritorio jam ekde la antikvaj tempoj.

En la antaŭhistoriaj epokoj altemis ĉi tie diversaj popoloj, la ĉeeston de ĉi tiuj popoloj atestas hodiaŭ jam nur la arkeologiaj trovaĵoj., la historio de la pejzaĝo skribita en la tero. Oni ofte trovas neadentite ankaŭ hodiaŭ la postsignojn de la neolitikaj kaj mezolitikaj homoj, la arkeologiajn malkovraĵojn de la bronzepoko kaj de la fer-eraro. Dum la lastaj jardekoj venis la vico al malkovro de signifaj Keltaj, Romiaj, Hunaj, Avaŭraj, Slavaj kaj Prahungaraj memoraĵoj.

La unua skriba mencio de Komárno devenas el 1037, kiam reĝo Stefano donacis la foir kaj pramenspezojn de la setlejo al la monaĥejo de Bakonybél. El histografia vidpunkto de la urbo rolas kiel ranga historia fonto la diplomo de reĝo Géza eldonita en 1075 tiel same la donacdokumento de la reĝo Béla la kvara eldonita al Folwyne en 1245, kiu konigas la unuan pli gravan fortifikon de la burgo de Komárno post la Tataara invado, kaj ankaŭ keltajn eventojn de la Tataara detruo. Post la retiriĝo de la Tataaroj la reĝo Béla la kvara insistis pri la prosperigo de la mezepokaj urboj, por ke li povu apogi sin sur la plifirmiĝanta burgaro. En mallonga tempo 25 urboj gajnis de li pli signifajn privilegiojn, inter ili ankaŭ Komárno, kiu gajnis siajn urbajn jurojn en 1265, kaj kiu originis el la unuiĝo de tri setlejoj: Villa Camarum, Villa Kezw kaj Villa de Sankta Andreo. Sed la urbo ne ĉiam estis reĝa bieno, ĝiaj magnataj posedantoj altemis ofte.

Dum la tempoj de la feŭda dispecigiĝo neniu el ĝiaj feŭdestroj okupiĝis pri ĝia evoluigo, nur la regado de Matiaso Korvin kontribuis en pli signifa mezuro al ĝia ekprospero. La memoron de Matiaso gardis longe en la urbo la grandiozaj renesancaj palacoj konstruitaj de li, la burgo transformita en brilan reĝan vilaon kaj la esplanado estigita ĉe la enfluejo de la rivero Vág. Bedaŭrinde ĉio tio tute kaputiĝis dum la Turkaj militoj.

La loĝantaro de Komárno renkontiĝis la unuan fojon kun Turka armeo en 1529, kiam la sultano Solimano survoje al Vieno eksieĝis bruske la urbon. Sed Ferdinando sukcesis reokupi la setlejon en mallonga tempo, fortikigi ĝian burgon, kiu fariĝis baldaŭ sekve de la sencesaj fortifikaj laboroj la plej forta fortreso de la lando. La plej grandan Turkan atakon travivis Komárno en 1594, kiam la kanonoj de paŝao Sinan komplete ruinigis ne nur la tutan urbon, sed ankaŭ la renesancaj palacojn konstruitajn de Matiaso. Ekde tiam ĝis la fino de la kontraŭturkaj bataloj, poste de la kontraŭhabsburgaj ribeloj en la urbo ne dauris pli signifaj konstrulaboroj krom la sencesaj fortikaj laboroj de la fortreso kaj de la remparoj ĉirkaŭprenantaj la urbon.

Dum la longaj jarcentoj de la Habsburga regado Komárno kontrastis eteme la fortifikajkomandantaron, ĉar la regantoj fortigis vane multfoje la privilegiojn de la urbo, la loka armeestraro neniam estis preta por priatenti ilin. Finfine la 1745-a jaro cesigis la senindulgan malamikecon, kiam Komárno ricevis de Maria Teresa la titolon de la libera reĝa urbo. La diplomo temanta pri tio resumis la jurojn de la urbo en 20 punktoj, el inter kiuj ni povas mencii kiel la plej gravajn: la juron de la partopreno je la parlamento, la eblecon de la validigo de la bienposedanta juro, la juron de la jugado, tiel same la liberigon de la urbo kaj ĝiaj gildoj el sub la jurisdikcio de la soldataro.

La gildoj ludis jam dum la antaŭaj jarcentoj gvidan rolon en la vivo de la burgaro de la urbo, post ilia liberigo ja estis spertebla generala ekprospero. La unua gildo, tiu de la botistoj ekzistis jam en 1643 en Komárno, poste dum la sekvaj jardekoj estigis ĉiuj gildorganizajoj de la tiuepokaj metioj. En la sekva etapo de la industria kaj komerca ekprospero, cefe je la komenco de la 18-a jarcento, prosperis pleje la gren-kaj lignokomercoj. El ĉi tiu tempo restis al ni la nomlisto de la pli ol 60 gren-kaj lignokomercistoj, kiuj estis plejparte Serboj, kiuj rifugis ĉi tien ĵak loksidiĝis en la urbo en la tempo de la Balkana ajtauenigo de la Turkoj.

Je la influo de la laborebleco, de la riceco kauxita de manufaktura industrio kaj de la komerco estis tiam Komárno rapide evoluiginta. En la urbo konstruigis luksaj burgodomoj kaj nobeldomoj konvene al la gusto kaj arkitektura stilo de la epoko.

Ĉi tiun promesplenan evoluon interrompis la tertremo havanta teruran forton, okazinta en 1763 la 28-an de junio. La dense ripetigantaj terpusoj postulis plurcent homajn viktimojn, 279 domoj kaj 7 pregejoj tute ruinigis,

785 domoj ja forte damagigis. Sed la urbo apenau superis ankoraŭ ci tiun gravan plagon, kiam denova tertremo detruis gin en 1783. Ci - okaze ankau la fortikaj sistemo damagigis tiomgrade, ke gi cesis servi siajn, originalajn celojn dum pluraj jardekoj. Post la dua tertremo la imperiestra kortego malpermesis la meton en ordo de la konstruaĵoj pli altaj ol du etagaj, kaj proponis la rekonstruon de la urbo sur la dekstra bordo de Danubo. Sed la burgaro de Komárno krocigis al sia praa nesto malgrau la multaj pezaj frapoj, kaj ne forlasis la teritorion de la urbo.

La setlejon trafis peza frapo ankau dum la Napoleonaj militoj, kiam la urbon kaj fortikajon metitajn en ordon oni fortigis per pli nova fuortoserio, kaj oni konstruis la tiel nomatan linion Nádor. Ci tiu proksimume 6 km-ojn longa fuortosistemo cirkaŭprenis la urbon en duoncirklo kaj etendigis de Danubo gis la enfluejo de la rivero Vág en Danubon. Por la fortifikaj laboroj oni eksposedigis kaj detruis plej malnovan parton de la urbo, kie oni forprenis kaj malkonstruins 243 domojn, versajne la plej malnovajn kaj plej tipajn, kiu povus signifi por ni la plej gradan valoron el la vidpunkto de la protektado de historiaj monumentoj. Ci tiu grandskala fortikigo de Komárno el strategia vidpunkto - cefe en la tempo de la displektado de la kapitalistaj produktadaj cirkonstancoj - influis malrapidige la elformigon de la industriaj kaj komercaj cirkonstancoj de la urbo. Post la elkonstruado de la linio Nádor certigis nur tri pordegoj la trafikon de la urbo direktigantan eksterne kaj internen, la plejparto ja de la neenkonstruitaj internaj parceloj venis en militistan proprietajon. Pro tio la disvastigantaj entreprenoj timis la urbon Komárno pro la fermitaj muroj sed ec loko apenau trovigis interne de la urbomuroj , tiel ci tio estas eble unu el la kauzoj de tio, ke dum la epoko de la generala industria ekprospero ne estigis ci tie pli konsiderindaj fabrikoj au aliaj instalajoj.

Pro la forsovigo de la komercaj vojoj kaj pro la iom - post - ioma regreso de la lokaj manufakturoj cesigis ankau la iama signifo kaj brilo de la urbo, gia logantaro malricigis malrapide. Por la malricigo de la urba logantaro atribuis konsiderinde ankau la malvenko de la Hungara burga demokrata revolucio en la jaroj 1848/49, kiam Komárno batalis ankoraŭ plu post la kapitulaco de Világos kaj kapitulacis nur kiel lasta. Tiam la imperiestraj armeoj tenis la urbon kaj gian fortikajon sub longa blokado , ili kauzis per la kanonado signifajn damagojn, poste la t.n. „ Kossuth - banknotojn“ retiritajn de la burĝaro de la subiginta urbo sen iu ajn kompensopago, forbruligis publike sur la vendoplaco de la urbo.

La evoluon de Komárno antaŭenigis signife la konstruado de la nova ŝifabrika, kies bazŝtonon oni metis la 23-an de aprilo 1947., sur la teritorio malantaŭ la pordego de Pozsony. En 1950 la jam finkonstruita ŝifabrika, kune kun la aliaj pli etaj uzinoj trinis en la urbon la laborfortojn, oni bezonis novajn loĝejoj. En 1960 oni finis la konstruadon de la loĝkvartalo No I., en 1961 tiun de la loĝkvartalo No II., poste inter 1961 kaj 1963 oni konstruis la 9 domblokojn konsistantajn el 428 loĝejoj de la loĝkvartalo No III. Paralele kun la loĝdomoj konstruiĝis ankaŭ trafikaj, industriaj, komercaj, higienaj, kulturaj kaj sportaj establaĵoj.

## MONUMENTOJ DE KOMÁRNO

La fortifikaĵsistemo de Komárno - nacia kultura heredaĵo,

Malnova kaj Nova Fortikaĵoj kun la Ŝtonvirgulino lokita sur la bastiono Madono ( sur la norda de la urbo, ĉe la enfluejo de rivero Vág en Danubon),

Linio Vág ( laŭ la rivero Vág)

Linio Nádor kun la pordego de Pozsony ( Bulvardo)

La Oficira Pavilono ( Kaszámya u. 2)

La Urbodomo ( placo Klapka György 1)

Statuo de generalo Klapka György ( placo Klapka György)

Konstruaĵo de Sankta Johano, sur la loko de la iama preĝejo Sankta Johano ( placo Klapka György 7)

La baroka statuo de Sankta Triunuo el la jaro 1715

La palaco Zichy (Placo Klapka György 9 )

La konstruaĵo de la iama impostejo ( Nádor u.8)

La romkatolika paroĝejo ( Nádor u. 11 )

La preĝejo, Sankta Andreo ( Nádor u.)

La konstruaĵo de la Laŭdanuba Muzeo - la iama Kulturpalaco, kun la statuo de Jókai Mór sur la korto ( Nádor u.)  
 La iama monaĥejo de la Benediktanoj ( Nádor u. 10 )  
 La kapeleto Sankta Jozefo ( Nádor u. 35 )  
 La konstruaĵo de la iama presejo Spitzer ( Nádor u. 37 )  
 La secesia konstruaĵo de la iama Provinca Sparkaso ( Nádor u. 39 )  
 La statuo de Lehár Ferenc en la parko prinomita de li ( Lehár u. )  
 La konstruaĵo de la iama Reduto ( Lehár u. 6 )  
 La konstruaĵo de la iama Kafejo Grand ( Kajo Duna 13 )  
 La grekortodoksa preĝejo ( Nádor u. 32 )  
 La juda preĝejo kaj azilejo ( sur la angulo de Eötvös - kaj Stúr u.)  
 La konstruaĵo de la plej malnova presejo de Komámo ( Ispotály u. 1 )  
 Marianum - la internulejo de la iama Benediktana Gimnazio ( Király püspök u.36 )  
 Memortabulo de Jókai Mór - sur la naskigdomo de la verkisto ( Király püspök u.10 )  
 La konstruaĵo de la iama ĉefpoŝtoŝtorejo ( Király püspök u. 3 )  
 La statuo de generalo M.R.Štefánik ( Placo M.R.Štefánik )  
 La sidejo de Matica slovenská ( Placo M.R. Štefánik )  
 La iama komitatdomo ( sur la angulo de la Megye.u. kaj Placo M.R. Štefánik )  
 La kapelo Sankta Anna kun la konstruaĵo de la iama domo por malriĉuloj ( Jókai u.6 )  
 La iama komitatdomo ( sur la angulo de la Megye u. kaj placo M.R.Štefánik )  
 La iama domo Schmidthauer ( Jókai u. 9 )  
 La konstruaĵo de la iama Popolbanko ( Jókai u. 24 )  
 Memortabulo de Jókai Mór - sur la domo, en kiu edukiĝis la verkisto ( Határör u. 1 )  
 Memortabulo de Selye János ( Határör u. 3 )  
 La justice Palaco ( Határör u. 6 )  
 La kalvinana preĝejo ( Jókai u. )  
 La konstruaĵo de la iama Kalvinana Interulejo ( Jókai u. 34 )  
 La konstruaĵo de la iama poŝto ( Jókai u. 36 )  
 La kalvariopreĝejo Sankta Rozalia ( Palaco Rozalia )  
 La iama garnizona preĝejo ( Ferences barátok u.)  
 Memortabulo de la du Péczely kaj Tóth Lőrinc sur la muro de la iama kalvinana episkoploĝejo ( Ferences barátok u. 22 )  
 Luteranaj preĝejo kaj paroĝejo ( Ferences barátok u. 15 )  
 La konstruaĵo de la iama kvarjara mezlemejo por knaboj, la hodiaŭa slovaka gimnazio ( Határör u. 12 )  
 La monumento de la murdiĝoj far la faŝistoj ( Placo Széna )  
 Akvoturo el la jaro 1902 ( Placo Széna )  
 La konstruaĵo de la Masinindustria Mezlemejo ( Petőfi u. 2 )  
 La Teatro Jókai ( Petőfi u. 2 )  
 La stacidomo ( Vasút u. )  
 La levponto ( Kajo Duna - Insulo Elizabeta )  
 Limtrapasejo ( Insulo Elizabeta )  
 Ponto Elizabeta - publikvoja limtrapasa Danubponto ( Insulo Elibazeta )  
 Kiosko de Jókai ( Insulo Elizabeta, Platanaleo )  
 La ĝardeno de la familio Jókai ( Insulo Elizabeta, Platanaleo )  
 Urba Tombejo kun la tombo de multaj famaj personecoj ( Temető-sor )  
 La juda Tombejo ( Aranyember u.)